

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №2



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №2 (280)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Alexander Shlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 68-69.

Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №2 (280).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 5 февраля 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. "Nia diligenta kolegaro": Antaŭparolo	6
Eventoj	10
Irek Bobrzak. Preskaŭ tricent aliĝintoj en la 9a JES ĉe la Balta Maro	11
Lu Wunsch-Rolshoven. Ĉiuj generacioj kune: Novjara Renkontiĝo	13
Andreas Diemel. Luminesk' tradiciiĝas	15
Katerina Arbekova. Blanka Novjarfesto en Siberio	16
Ĵenja Amis. Zamenhof-tago en Montrealo	17
Bruklino festas la Zamenhofan Jaron	18
Jurek Jurczyński. Hago: Zamenhof-festo en la Pollanda ambasadejo	19
J. V. Habán. Esperantistoj-vojaĝantoj renkontiĝis	20
"Abengo" Cho Chaoming. Gastoj el Zaozhuang vizitis Tajvanon	21
Jatina. Verdas Poploj Esperante en la lernejo Baiyangshujie	22
Esperantologia Konferenco en Lisbono	24
Aŭtoraj duonhoroj kaj Libroj de la Jaro dum la 103a UK	24
UK-103: Kulturministro alte protektos	25
Nova prezidanto de TEJO	25
Silfer denove estas Konsulo de la Esperanta Civito	25
Peter Baláž. SES 2018 – speciale program-riĉa	26
Elstaraj instruistoj, kvar kursoj kaj KTF	27
Aliĝu al la 74a IJK en Hispanio	29
Nekrologoj	30
Koncize (12 informoj)	31
Tribuno	32
Esperanto ĉiam vivos, kaj finfine sukcesos: Intervjuo kun Trezoro Huang Yinbao	33
Teresa Nemere. Toruno: Ni uzu neesperantistajn fortojn	39
Deklaro de UEA okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro	40
Arkivo	41
Vytautas Šilas. Liudas Alseika esperantistiĝis kaj pereis en Ruslando	42
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en februaro 2018	44

Kulturo 45

Paweł Fischer-Kotowski. La libroj de la jaro 2017.....	46
Aleksander Korĵenkov. Nia libroproduktado en la plej mallonga jaro	51
Tigran Pogosjan. La derviŝoj (Tradukis V. Sarkisjan)	55
Halina Gorecka. Leteroj de kvin geamikoj al Julia, Julieta (Recenzo: Júlia Sigmond. <i>Kvin geamikoj</i>)	61
Ses jarkolektoj de <i>La Ondo</i> senpage haveblaj.....	62
Kompleta la 48a jarkolekto de <i>Literatura Foiro</i>	63
Ricevitaj gazetoj	63
Roberto Pigro. Muzika konkurso “Ora Insulo”	64
Literatura konkurso “Hristo Gorov – Hrima”.....	64

Mozaiko 65

Viktor Alikin. Krucvortenigmo	66
Gratulon al Valentin kaj Irina.....	66
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....	67
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	68

Kelkajn tagojn post la Novjarfesto la esperantistoj en la Slovakia urbo Liptovský Mikuláš organizas tradicion turisman renkontiĝon (p. 20) kun supreniro al la monto Poludnica (1549 m) en Malaltaj Tatroj, de kiu oni povas vidi la apudan montregionon. Se vi ankoraŭ ne estis tie, planu viziton por ĉi-jara julio, kiam (bedaŭrinde, sen neĝo) Liptovský Mikuláš akceptos la partoprenantojn de la Somera Esperanto-Studado (p. 26). (Foto: Ján Vajs).

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

NIA DILIGENTA KOLEGARO

HALINA
GORECKA

ALEKSANDER
KORJENKOV



Post kelkaj tagoj en Kaŭno estos presita enciklopedio pri 200 eminentaj esperantistoj, kiun kuneldonas la Ruslanda eldonejo *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio. En la sekvaj paĝoj vi povas legi la antaŭparolon al *Nia diligenta kolegaro*. Legu pli pri ĝi en nia retejo: <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120.htm>

“Nia diligenta kolegaro”: Antaŭparolo

En preskaŭ ĉiu librovendejo (krom tre etaj kaj fakaj) oni facile trovas breton aŭ bretonaron kun libroserioj, kiuj prezentas 100 (malpli ofte 50, 200, 250 aŭ 500) eminentulojn de iu fako, popolo aŭ lando. Ekzemple, en librovendejo troviĝanta je kelkminuta promendistanco de nia redakcio estas tiaj volumoj pri (alfabetorde) aktoroj, amatorinoj, antikvuloj, aventuristoj, futbalistoj, murdistoj, pentristoj, piratoj, saĝuloj, sciencistoj, stranguloj, suicidintoj, ŝakistoj, teroristoj, tiranoj, venenistoj, verkistoj, vojaĝantoj kaj *50 geniuloj, kiuj ŝanĝis la mondon*. Apudas imponaj volumoj pri elstaraj judoj, moskvanoj, romianoj, ruslandanoj, usonanoj... Pli multaj el ili estas abunde farĉitaj per buntaj bildoj kaj marĝenaj anekdotecaj informoj, sed aliaj estas pli fundamentaj enciklopedioj kun altnivele verkitaj artikoloj.

En la libroamaso pri tiuj anoj, istoj kaj uloj mankas libro pri eminentaj esperantistoj. Ĝi mankas ne nur en la rusa lingvo, sed ankaŭ en la ceteraj lingvoj, inkluzive de Esperanto mem. Jes, danke al la reeldonoj (1979, 1986), je ĉies dispono estas la mirinda *Enciklopedio de Esperanto* (EdE) kun artikol(et)oj pri ĉirkaŭ 1500 esperantistoj, 450 libroj ktp. Sed malgraŭ la granda historia valoro de EdE, oni scias, ke ĝi aperis antaŭ pli ol 80 jaroj kaj ĝiaj plej novaj informoj venas el majo 1934; krome, la artikoloj en ĝi estas verkitaj de pluraj aŭtoroj, kiuj havis malsamajn ideojn pri la



stilo kaj amplekso de siaj tekstoj, sekve de kio enestas, ekzemple, jena artikolo “Esteban (estevan) Manuel, hispano. Mortis. Estis prez. de HSPE. Kuntradukanto de la H. ŝlosilo, verkis broŝurojn”, kiu silentas pri la vivojaroj, loĝurbo, profesio kaj la jaro de la esperantistiĝo de ĉi tiu aktivulo.

La projekto de nova Esperanto-enciklopedio, lanĉita antaŭ preskaŭ 50 jaroj sub la aŭspicio de CED, iom post iom ĉesis, sed ne malaperis la ideo inde prezenti niajn eminentulojn. En 2000 la redaktoro de *Literatura Foiro* Ljubomir Trifonĉovski petis legantojn de la revuoj aliĝintaj al la Esperanta Civito sendi proponojn por la nomlisto de la libro *La cent plej eminentaj esperantistoj de la 20a jarcento*. Post du jaroj li publikigis la liston (la nomojn garnis koncizaj prezentoj, unu el kiuj poste estis vaste citata: “Bernard Golden: Nia plej grava intelektulo el nigrarasa deveno”). Sed ankaŭ ĉi tiu projekto ne realiĝis.

Intertempe aperis kelkaj enciklopedioj kaj konsultlibroj landaj (Estonio, Japanio, Jugoslavio, Kroatio, Slovakio, Svislando) kaj literaturaj (de Josip Pleadin kaj Geoffrey Sutton). Multaj entuziasmuloj artikolis pri Esperanto-aktivuloj en Vikipedio, sed, bedaŭrinde, nur malmultaj el tiuj tekstoj estis kontrolitaj de fakspertaj redaktoroj.

Sendepende de la menciitaj projektoj, meze de la 1980aj jaroj ni ekkolektis materialon pri la historio de Esperanto – librojn, gazetartikolojn, rememorojn, fotojn – kiujn ni uzis en prelegoj kaj eldonaĵoj, interalie, en la biografiaj sekcioj de *Esperanto en Ruslando* (2000) kaj *Historio de Esperanto* (2005). En 2007 ni decidis, ke post la eldono de *Homarano* (ĝi aperis en julio 2009) ni eklaboros pri la enciklopedia leksikono pri Esperanto-eminentuloj, kiu ricevis la nomon *Nia diligenta kolegaro* (NDK).

Esplorinte plurajn enciklopediojn, ni kompilis la skemon, kaj fine de 2007 laŭ ĉi tiu skemo ni verkis la unuan artikolon (pri William Auld) kaj sendis ĝin al kelkaj Esperanto-historiistoj. Ricevinte iliajn komentojn, ni iom modifis la skemon, kompilis demandilon kaj dissendis ĝin al deko da personoj el la komenco de la alfabeto nomlisto de NDK.

Ĉi tiu centnoma listo baziĝis sur la listo de Trifonĉovski kun ĉ. 80 nomoj el ĝi. La listo baldaŭ ekkreskis, ĉar estis aldonitaj plej gravaj Esperanto-agantoj en la sferoj de movad-organizo, informado, instruado, scienco, esperantologio, literaturo, muziko, teatro, eldonado, redaktado, radio, interreto, komerco, turismo k. a. Ni enmetis la nomojn de la prezidantoj de UEA (krom Max Liniger) kaj de la Lingvaj Institucioj (krom John Mabon Warden). Ni ankaŭ konsideris la listojn de la laŭreatoj de la ĉefaj Esperanto-premioj kaj de la personoj, kiuj ricevis la titolon de la Esperantisto de la Jaro. (Vidu ĉi tiujn listojn librofine). Post ĉi tiu kompletigo la listo iĝis preskaŭ ducent-noma.

Pluraj kunlaborantoj de NDK kaj tiuj, kiuj sendis siajn biografiojn, rekomendis enmeti pli da siaj samlandanoj, samfakuloj kaj amikoj. Lujn proponojn ni danke akceptis, sed ni konsentis nek kun paroĥismaj ideoj “eternigi nian karmemoran

klubestron”, nek kun “reprezenta principo”, laŭ kiu ĉiu lando havu en la libro almenaŭ unu sian anon. Ni ne cedis ankaŭ al la argumentoj de la “politika ĝusteco”, pledintaj por pli da virinoj, junuloj, afrikanoj k. s. La ĉefa kriterio estis kaj restis nur la graveco de la kontribuo de ĉiu konkreta persono, sendepende de ties nacia kaj seksa apartenoj. Pro tio en NDK plej multas eŭropaj viroj, kiuj dum la unua jarcento de Esperanto disvastigis la lingvon kaj riĉiĝis ties aplikadon en diversaj sferoj de la homa vivo.

Fine, estis verkitaj 231 biografioj, kaj ni jam pensis pri 250, sed post konsulto kun Detlev Blanke, kiu ĝis sia neatendita morto kuratoris nian projekton flanke de CED, ni decidis redukti la nombron al 200. Ĉirkaŭ dek artikoloj, malgraŭ persista serĉado, malhavis esencajn biografiajn faktojn, kaj pro tio ni devis forigi la tekstojn pri, interalie, Veselin Damjanov kaj Paul Hübner. Ĉe plia reduktado rimarkinde perdis, interalie, Francio kaj Hungario, kiuj ankaŭ post tiu reduktado estas plu elstare reprezentitaj en NDK.

Kiel menciite, malkiel en EdE, ĉiuj artikoloj en NDK sekvas la saman skemon, sen emocia pritakso, kun faktoj kontrolitaj. La tipa artikolo konsistas el kvar bazaj partoj.

1. Personaĵoj. Nomoj, se necese kun proksimuma prononco (al la literoj Esperantaj ni aldonis la indikon pri la nazaleco kaj la literojn “ö” kaj “ü” por la respektivaj sonoj en kelkaj eŭropaj lingvoj); apartenoj nacia kaj ŝtata; dato kaj loko de la naskiĝo; familio; studado, profesia kaj scienca kariero; socia kaj politika agado, eksteroficaj interesoj kaj hobiaj; lingvokonoj; distingo pro profesiaj, kulturaj kaj aliaj meritoj (ne pro Esperanto); edz(in)iĝoj kaj infanoj; omaĝoj kaj memoraĵoj (monumentoj, stratnomoj, festlibroj k. s.); aktuala loĝloko (por la vivantoj); dato kaj loko de la morto (por la forpasintoj).

2. Esperanto-agado. Jaro kaj maniero de la esperantistiĝo; ĉefaj agadoj per/por Esperanto; oficoj en la movadoj loka, landa, internacia (kun la oficojaroj); verkado; arta agado; redaktado de libroj, gazetoj, radioj, podkasto (kun jaroj); kontribuo al gazetoj kaj al gravaj artikolaroj; honora membreco en Esperanto-organizo; Esperanto-premioj; esperantisteco de la familianoj.

3. Ĉefaj verkoj:

V Libro (ne pli ol 25 titoloj por unu persono kun la escepto de Zamenhof, kies ĉefaj verkoj nepre devis esti menciitaj).

M Sondiskoj, sonkasedoj, KDoj.

F Filmoj.

Ĉiuj eroj en ĉi tiu parto estas ordigitaj kronologie, estas notitaj nur la unuaj eldonoj.

4. Bibliografio: Rekomendataj fontoj laŭ kvar kategorioj, dividitaj per punkto; ene de ĉiu kategorio per punktokomo, **B**:

4a. Enciklopedioj kaj la plej gravaj konsultlibroj (sigloj, alfabetorde).

4b. Aliaj libroformaj verkoj (laŭ la alfabeto ordo de la aŭtoroj).

4c. Gazetartikoloj (laŭ la kronologia ordo).

4ĉ. Interretaj fontoj (ne estas menciitaj la retekatalogoj de IEM, UEA, UFE kaj aliaj vaste konataj katalogoj, ankaŭ Vikipedio ne estas menciita).

En NDK estas multaj ĝeneralaj kaj Esperantaj mallongigoj, kies liston vi povas vidi sur p. 7-10. Ni uzis la kutiman enciklopedian stilon, uzitan ankaŭ en EdE. Pro tio preskaŭ ĉiuj frazoj, inkluzive de la subordigitaj propozicioj, estas sensubjektaj (la mankanta subjekto estas la persono, al kiu estas dediĉita la artikolo), krom la okazoj, en kiuj la manko de la subjekto eble kreus miskomprenon.

Nia ĉefa leksika referencilo estis PIV kaj ties postaj eldonoj. Krome, en NDK estas uzataj kelkaj geografiaj nomoj, ne registritaj en PIV, sed vaste uzataj en la Esperanto-vivo: Ĉaŭdefono (La Chaux-de-Fonds, Svislando), Lillo (Lille, Francio), Lodzo (Łódź, Pollando), Nanto (Nantes, Francio), Neŭŝatelo (Neuchâtel, Svislando), Paranao (Paraná, Brazilo), Poznano (Poznań, Pollando), Toruno (Toruń, Pollando), Utreĥto (Utrecht, Nederlando), Vroclavo (Wrocław, Pollando).

Laŭ proksimuma takso, nia duopa laboro daŭris dum pli ol 6000 laborhoroj. Por la laboro ni aĉetis librojn kaj gazetkolektojn kontraŭ pli ol mil eŭroj kaj uzis simile grandan sumon por mendi kopiojn de pli ol dek mil paĝoj. Ĉi tiuj kopioj, konservataj en ĉirkaŭ 2100 dosierujoj, nun plenigas speciale aĉetitan “Enciklopedian ŝrankon” en nia negranda loĝejo.

La eldono de NDK ne signifas, ke finiĝis niaj kolektado, esplorado kaj dokumentado; ni daŭre kolektas kaj sistemigas novan materialon, kiu estos uzata en la iam aperonta dua eldono, kiu entenos 250 biografiojn.

La redaktoroj de EdE skribis antaŭ 84 jaroj, ke “neniu Enciklopedio povas kontentigi dezirojn ĉiufankajn”. Ankaŭ ni komprenas, ke nia laboro kaj la laboro de niaj helpantoj kaj provlegantoj ne estas komplete kaj senerara. Ni volonte akceptos kaj registros aldonajn informojn, kiuj iukiale mankas en la artikoloj. Ni ankaŭ estos dankaj al niaj legantoj pro korekto de faktaj eraroj kaj de neeviteblaj mistajpoj. Sendu viajn atentigojn retpoŝte al la retadreso laondodeesperanto@gmail.com.

Se vi legas ĉi tiujn vortojn, vi versajne aĉetis ĉi tiun libron aŭ pruntis ĝin ĉe amiko aŭ en biblioteko por uzi ĝin, kaj tio signifas, ke ni laboris ne vane. Ni esperas, ke ĉi tiu enciklopedio, ŝtopinta gravan breĉon en la kulturo de nia lingvokomunumo, trovos favoran kaj kompreneman akcepton de vi kaj de aliaj legantoj, kaj ke la siglo NDK baldaŭ estos same kutima en Esperanto kiel PIV, PAG kaj EdE.

Nia diligenta kolegaro / en laboro paca ne laciĝos...

Kaliningrado
15 jan 2018

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

Eventoj



La gajajn decembrajn Zamenhof-Festajn renkontiĝojn kaj klubkunvenojn, kiuj okazis en multaj landoj, sekvis la tradiciaj Novjarfestaj renkontiĝoj, eĉ pli gajaj kaj mojosaj, kun novjaraj baloj, ekskursoj kaj koncertoj, en kiuj oni ĝuis la arton de niaj kantistoj, inter kiuj en JES estis ankaŭ Kim Henriksen, la legenda Kimo kun sia akordiono. (Foto: Anna Tomzik)

Preskaŭ tricent aliĝintoj en la 9a JES ĉe la Balta Maro

Inter la 26a de decembro 2017 kaj la 2a de januaro 2018 en Ŝĉecino (Szczecin, Pollando) okazis la 9a Junulara Esperanto-Semajno (JES), al kiu aliĝis 286 personoj el 34 landoj de kvin kontinentoj.

Organizita de *Varsovia Vento*, Germana Esperanto-Junularo (GEJ), kun kontribuo de Pola Esperanto-Junularo (PEJ), sub honoraj patronecoj de la vojevodio kaj urba aŭtoritatoj, rimarkita de signifaj lokaj atlernejoj – kiel la Ŝĉecina Universitato kaj Okcidentpomerania Universitato Teknologia – kiel kutime (krom la novjara balo) JES proponis al la partoprenantoj interesan kaj vigan programon de atelieroj, trejnadaj kursoj, prezentadoj kaj koncertoj. Ĉiutage eblis ekzemple, ekzerci pri “Kiel esprimi sin en Esperanto poezie” sub la gvido de Jorge Camacho – ano de la ibera skolo, diskuti pri la gramatiko kun Bertilo Wennergren, aŭtoro de *Plena Manlibro de Esperanto-Gramatiko* (PMEG), tuŝi malfacilajn temojn en psikologiaj paneloj de Danka Leyk “Anatomio de (la) amo”, lerni diversajn dancojn aŭ evolui muzike en atelieroj de Kimo, ĴeLe, Melono kaj Bertilo kun Birke. Ne mankis ĉiutagaj trejnadaj pri diversaj temoj kaj novula programo sub la internacia gvido de Jana Kamenická kaj Viktoro Solé.

JES denove estis mojosa kaj amasa (Foto: Ivo Miesen)





Kantas Jonny M (Foto: Anna Tomzik)

Kompreneble dum la daŭro de JES okazis multe pli – ekde la mateno ĝis la vespero la paralelaj programaj proponoj sekvis en kvin diversaj salonoj, kion plikolorigadis ekskursoj en la urbo kaj renkontiĝoj kun diversaj lokaj gastoj. Rezentantoj de la Ŝĉecina Polico instruis la partoprenantojn pri la krimaj danĝeroj en la reto, la Maltaj Kruckavaliroj invitis al la kuna trejnado de la mezepokaj dancoj, studenta rokbando *Sedium* kaj la loka tamburteamo, trejnanta sin en Palaco de Junularo, prezentis siajn koncertojn. Tiuj, cetere, ne mankis dum la vespera programo, dum kiuj oni kunkantis dancante kun Kimo, Bertilo kaj Birke, Jonny M kaj ĵaze kun Melono. La muzikaj vesperoj, kiuj atingadis meznokton, estis nur ia komenco de la nokta vivo. Tiu daŭris ĝis mateno en la trinkejo, gufujo kaj en la ampleksa centra renkontiĝejo, kie krom senpaga tea-kafa bufedo troviĝis ludejo kun tablaj ludoj kaj riĉa libroservo organizita de Johano Pachter. Karde de la JES okazis krome kunsido kaj prezentado de la internacia Amikumu-teamo kaj seminarioj, prezentadoj kaj komitatkunsidoj de TEJO kaj GEJ.

Ne eblas koncize priskribi ĉion, kio okazis dum tiu verva, vigla kaj etosa semajno. Ĝojigas grava kontribuo al la programo flanke de la partoprenantoj, sindediĉa laboro de la organiza teamo, ankaŭ helpo de la loka esperantistaro, precipe de Kari kaj Benia. Interesa kaj esperdona evidentiĝis ankaŭ tutsemajna kontakto de la skoltroj lokaj kun la verdaj, esperantistaj, kio eble influos kreskon de la internacia skolta movado. Restas nur danki al ĉiuj partoprenantoj kaj organizantoj, danke al kiuj la Junulara Esperanto-Semajno iĝis neforgesebla renkontiĝo kun ĝojo kaj Esperanto. La sekva JES, jubilea jam ĉar la 10a, okazos inter la 28a de decembro 2018 kaj la 4a de januaro 2019 en Hirŝluĥ (Storkow-Mark) apud Berlino. Bonvenon!

Irek Bobrzak

Ĉiuj generacioj kune: Novjara Renkontiĝo

Eble la plej karakteriza eco de la Novjara Renkontiĝo (NR) estas la unusemajna kunvivado de homoj el pli malpli ĉiuj generacioj. Ankaŭ pasintjarfine inter la 201 partoprenintoj ĉeestis sesdeko da infanoj kaj junuloj ĝis 20 jaroj, kaj kompreneble la generacio de iliaj gepatroj, ties amikoj, konatoj kaj pliaĝuloj ĝis alta aĝo. La loko, en Saarbrücken, tuj apud la franc-germana landlimo, zorgis pri bela internacia miksaĵo – la partoprenantoj venis el 16 landoj.

La programo de la 16a Novjara Renkontiĝo, kiu okazis inter la 27a de decembro 2017 kaj la 3a de januaro 2018, estis same varia. Kutime okazis kvar ĝis ses programeroj samtempe. Estis prelegoj pri plej diversaj temoj, kelkaj kadre de la Internacia Vintra Universitato (IVU); estis diskutoj, laborgrupoj, lingvaj kursoj kaj klarigoj pri nia lingvo.

Infanoj, junuloj kaj interesitaj plenkreskuloj ĝuis aliajn programerojn, ekzemple diversan kreadon aŭ aŭskultadon de fabeloj kaj de nigraj kaj piĝamaj rakontoj. Junuloj povis turniri pri tabloteniso, konstrui blinklumojn, songenerilojn kaj pontojn el papero. Okazis Mezepoka Turniro, kiu multe entuziasmigis la partoprenantojn. Eblis triki bestetojn kaj ŝuetojn, feltumi braceletojn kaj legosignojn, krei lumpentraĵojn aŭ naturajn kosmetikaĵojn. Okazis movigaj ludoj, senstreĉiga gimnastiko kaj budhisma meditado.

En la interkona vespero oni interŝanĝis kunportitajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kio bone helpis survoĝigi interbabiladon. Dum pliaj vesperoj okazis koncertoj, de *Kajto*, kiu kvarope jubilee koncertis, kaj de Jonny M; ambaŭ ravis sian publikon. Estis luda vespero kaj varietea kun bunta oferto de prezentoj, kelkaj je mirinde alta nivelo. La internacia vespero ofertis belan gamon de pianludado kaj pupteatraĵetoj ĝis ĵonglado kaj popoldancado – kun granda kaj fervora engaĝiĝo de infanoj kaj junuloj.

Dumtage estis kafejo, vespere ĉi-jare aldoniĝis du pliaj kunvenejoj, drinkejo kaj trankvila gufujo. Silvestre oni ĝuis festan bufedon, dancadon kaj, kompreneble, multan babiladon.

Eble indas iom prezenti la prelegan programon. Kadre de la Internacia Vintra Universitato okazis prelegoj pri “Grandaj, grandegaj kaj eĉ pli grandaj nombroj” (Klaus Rumrich), “Nigraj truoj”, “Suneklipsoj” kaj “Minacoj el la Spaco” (Ĉiuj Amri Wandel) kaj prezentiĝis “Familia poziciigado” laŭ Hellinger (Ankica Jagnjić). Menciindas la scienca kvizo.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La 19an de januaro en sia domo en Poznano subite mortis

Paweł Janowczyk (1960–2018)

Li studis politologion kaj ĵurnalismon en la Poznana kaj Varsovia universitatoj, sed dum la lastaj 20 jaroj gvidis sian propran firmaon *Tago* pri vendado de libroj (ankaŭ en/pri Esperanto) kaj kancelariaĵoj.

Esperantisto de 1975, li jam en la studenta aĝo montris sian organizan talenton, kiel prezidanto de la legenda Pola Studenta E-Komitato (PSEK) en la komplikitaj cirkonstancoj de la milita stato en Pollando kaj poste kiel prezidanto de la Pola E-Junularo (li estas honora membro de PEJ), ĝenerala sekretario de PEA, komitanano de TEJO kaj redakciano de *Studenta Gazeto* kaj *Pola Esperantisto*.

Sed plej brile liaj kultur-organizaj kapabloj riveligis en la revivigo kaj prosperigo de ARKONES. Ne supertakseblas liaj meritoj en tio, ke ĉi tiu sendependa kultura kaj arta esperantista renkontiĝo en Poznano iĝis la plej grava el ĉiujaraj E-eventoj, organizataj en unu urbo, kun elstara programo muzika, teatra, kleriga kaj scienca. Li ne verkis librojn, nek koncertis sur scenejo, sed danke al li pluraj komencantaj aŭtoroj, kantistoj kaj aktoroj post prezentiĝo en ARKONES ricevis fortan stimulon daŭrigi sian kreadon en Esperanto. Malgraŭ sanproblemoj, kiuj venis post kor-operacio okazinta antaŭ kelkaj jaroj, li ne malintensigis sian E-agadon.

Li forpasis je sia 58a vivojaro, en la Zamenhofa aĝo.

Por ni Paŭlo estis kara amiko, interesa kunparolanto, komprenema helpanto, afabla gastiganto en Poznano kaj agrabla gasto en Kaliningrado, fidela abonanto de *La Ondo*...

Ni funebras kaj kondolencas al lia vidvino Oksana kaj al lia filino Miriam pro la perdo de la edzo kaj patro.

**Halina Gorecka,
Aleksander Korĵenkov**

La 10an de januaro 2018 forpasis

Davor Grgat (1935-2018)

Murpentristo, meblokolorigisto kaj ĵurnalisto; lerninte Esperanton (ekde 1954), li disvastigis kaj instruis la lingvon en Split kaj aliaj urboj de Jugoslavio kaj Kroatio, kunlaboris en *La Suda Stelo*, *Internacia Ĵurnalisto*, *Tempo*, *Monato* kaj aliaj E-gazetoj.

La 15an de januaro 2018 en sia 91a vivojaro mortis

Petras Rukšėnas (1927-2018)

litova gazeta kaj radiofonia ĵurnalisto, kaj ĝardenisto. Esperantisto ekde 1937, li reaktiviĝis en 1957, dum 1967-94 aranĝis disaŭdigon de pli ol 200 novaĵ-sciigoj pri Esperanto kaj esperantista agado, verkis artikolojn en/pri Esperanto, estis estrarano de la Vilna E-kluvo, estrarano de Litova E-Asocio, redakciano de *Horizonto de Soveta Litovio* k *Litova Stelo*.

La 27an de januaro 2018, en la aĝo de nur 52 jaroj, forpasis

Fabienne Berthelot (1965-2018)

franca soci-psikologino kaj esperantistino, la edzino de István Ertl kaj la patrino de iliaj tri infanoj: Klára, Ruben kaj Dorián.

Ni funebras kaj kondolencas.

En decembro 2017 la prezidentino de Kroatio Kolinda Grabar-Kitarović vizitis la 4an elementan lernejon en Bjelovar k partoprenis en la projekto “Kroatio legas”, legante ĉapitron el la romano de Mato Lovrak *La trajno en la neĝo*; fine de la programo la prezidentino, kiu en sia junaĝo lernis Eon, ricevis donace ekzempleron de la Ea eldono de ĉi tiu libro. (Kresko)

Jam ĉ. 1.500.000 personoj eklernis Eon ĉe Duolingo, inter ili ĉ. 1 mln 300 mil en la angla-lingva k ĉ. 300 mil en la hispanlingva kursoj. (Duolingo.com)

La E-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, situanta en la centro de Vieno, pasintjare havis 21 mil 256 vizitantojn; tio estas rekordo por la muzeo, kiun en 2016 vizitis 15 mil 937 personoj. (El Popola Ĉinio)

Invitite de la juda altlernejo de la juda komunumo de Berlino, Prof. Dr. Liliana Ruth Feierstein 28 nov 2017 prelegis pri “Grüner Stern. Esperanto und die Geschichte einer jüdischen Sprachutopie” (Verda stelo. Eo k la historio de juda lingva utoptio) okaze de la mortotago de Zamenhof en la juda kunveno de Berlino. (Eo in Berlin und Brandenburg)

Inter pli ol 400 gastoj de la Granda Amuzvespero de “Printempa Festo de Liaoning-aj Ekonomiaj kaj Kulturaj Rondoĵoj”, okazinta 7 jan 2018 en Shenyang, ĉefurbo de provinco Liaoning (Ĉinio) estis kvar estraranoj de Liaoning-provinca E-Asocio (LEA), kiuj prezentis Eon al la partoprenantaro k ĵurnalistoj el gazetoj, novaĵretejoj k televido. (Landa Agado)

La Komitato de UEA elektis Aleks Kadar k Bruĉjo Kasini komitatanoj C, ke ili povu kandidati por la posteno de Ĝenerala Sekretario de UEA; en la posta voĉdonado por tiu posteno partoprenis tri kandidatoj: Aleks Kadar 21 vocoj, Bruĉjo Kasini 5, Orlando Raola 21, sindetenoj 6. Ĉar neniu kandidato ricevis pli ol duonon de la nombro de la valide donitaj voĉoj (27) nun okazas reta voĉdonado kun Kadar k Raola kiel kandidatoj. (komitato-de-uea)

Societo Internacia por Paco Universala (SIPU, Burundo) organizis en decembro informajn kunvenojn pri Eo al pli ol cent geinstruistoj en du liceoj de la buĵumbura provinco; la lecionojn gvidis prof. Giorgio Silfer. (HeKo)

21 dec 2017 Tugchin Khurelbaatar, nepino de la fama mongola e-isto Chimid Dogsuren (1934-2002), estis elektita kiel prezidanto de Mongola E-Societo; eksprezidanto Chimedtseren Enkhee, sekretario de KAEM, kunlaboras kun ŝi kiel unu el estraranoj de MES. (Landa Agado)

La Estraro de TEJO decidis, ke la 75a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos somere 2018 en Liptovský Hrádok, Slovakio. (tejo.org)

La e-isto Dmitrij Bogatov, arestita en Moskvo en aprilo 2017, estas liberigita el hejma aresto. Tamen plu daŭras la krim esplorado pro liaj suspektataj “alvokoj al terorismo”.

La 50an, jubilean Internacian E-Sumoon, konkurson pri legado de E-libroj, okazintan la 14-28 jan, partoprenis 310 personoj el 34 landoj, plej multe el Japanio (86), Francio (38) k Pollando (20); ili legis sume pli ol 15 mil paĝojn. (Hori Jasuo)

Je 1 feb 2018 al la 103a UK de Eo en Lisbono aliĝis 1084 e-istoj el 61 landoj; plejmulte el Francio 200, Germanio 94, Brazilo 72, Japanio k Pollando po 69, Hispanio 50, Belgio 41, Italio k Koreio po 31, Ruslando 30, Usono 28, Britio 27, Nederlando k Portugalio po 26. (uea.org).

Tribuno



La januara *Ondo* informis, ke la 55-jara ĉina agronomo, ekonomikisto, entreprenisto kaj esperantisto Huang Yinbao, konata en Esperantujo kiel Trezoro, estis elektita la Esperantisto de la Jaro 2017 pro tio, ke li iniciatis kaj ekredaktis la Esperanto-version de *Unesko-Kuriero*, kunmetis por ĝi tradukteamon, kaj krome lanĉis la sendependan revuon *Tra la mondo*. Malgraŭ sia granda okupateco li volonte konsentis respondi niajn demandojn. (Foto: Huang Xiaojuan)

Esperanto ĉiam vivos, kaj finfine sukcesos

Intervjuo kun Trezoro Huang Yinbao

Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro 2017?


Tiu honoro apartenas al ĉiuj membroj de la teamo de *Unesko-Kuriero* en Esperanto. La informo pri la Esperantisto de la Jaro 2017 tuj vekis en mia cerbo la esprimon, ke la plej feliĉa afero estas atingo de duoblaj ĝojoj. Du ĝojigaj aferoj mirakle okazis, unu post la alia, ĉirkaŭ la Zamenhofa Tago. Kelkajn tagojn antaŭ la anonco pri la elekto de la Esperantisto de la Jaro, mi kiel la ĉefredaktoro de *Unesko-Kuriero* en Esperanto faris prelegon en Unesko, subskribis kunlaboran kontrakton pri eldono de *Unesko-Kuriero* tuj post mia prelego, sukcese kunsidis kun Unesko-funkciuloj pri *Unesko-Kuriero* en ties oficejo. La du aferoj estas la plej grandaj ĝojoj kaj feliĉoj dum mia tuta esperantista vivo.

Vi ricevis ĉi tiun honoran titolon unuavice pro tio, ke vi “iniciatis kaj ekredaktis la Esperanto-version de *Unesko-Kuriero*, kunmetis por ĝi tradukteamon”...

Ne mi lanĉis la ideon eldoni *Unesko-Kurieron* en Esperanto. Post la publikigo de la Unesko-rezolucio de Montevideo (1954) multaj esperantistoj esperis, ke Unesko eldonos ĝin en Esperanto. Post la Unesko-rezolucio de Sofio (1985) multaj esperantistoj per leteroj al Unesko forte proponis, ke ĝi uzu Esperanton. Kaj la plej facila uzado estas eldoni *Unesko-Kurieron* en Esperanto, kaj per tio ni povus montri al la mondo ke Unesko iamaniere akceptas Esperanton por realigi siajn celojn.

Post kiam la interreto populariĝis, kaj oni povis sendi retajn mesaĝojn tute senpage, Mario Fonseca alvokis esperantistojn inundi Uneskon per retaj mesaĝoj, petante eldoni la *Kurieron* en Esperanto. Laŭ lia alvoko, multaj esperantistoj sendis al Unesko amason da retaj mesaĝoj tre facile, kaj tute senkoste. Unu persono povis sendi eĉ cent mesaĝojn tage. Kaj tiamaj teknikistoj ankoraŭ ne havis sufiĉan kapablon bloki la spamajn mesaĝojn.

Tiu kampanjo ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiuj kontaktis tiaman Ĝeneralan Direktoron Osmo Buller, por ke UEA haltigu la retmesaĝan bombadon de Unesko. Laŭ la postulo de Unesko, Osmo Buller publikigis malferman leteron por ĉesigi la agadon, en kiu li interalie skribis: “Dum la pasintaj jardekoj UEA jam plurfoje diskutis



Antaŭ la enirpordo de la Centra Oficejo de UEA

pri la sama ideo kun respondeculoj de Unesko. Kvankam ŝanĝiĝis la respondeculoj, la respondo restis la sama: se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de *Unesko-Kuriero*" (*Eventoj*, 2000, №182). Post lia alvoko la esperantistoj ĉesis retmesaĝan bombadon al Unesko. Laŭ ĉi tiu letero, ekzistis ebleco eldoni la *Kurieron* en Esperanto, sed UEA ne havis buĝeton por financi la eldonadon. Post 12 jaroj la revuo bedaŭrinde ĉesis aperi pro manko de financaj rimedoj, ĉar en 2012 Usono ĉesis pagi la membran kotizon.

De septembro ĝis oktobro 2016, mi volontule laboris du monatojn en la Centra Oficejo de UEA. Laborante en la koro de Esperantujo, mi povis profunde pensi, kiel eblas plibonigi la uzadon de Esperanto. La 17an de oktobro 2016 mi legis en la retejo de Unesko, ke la registaro de Ĉinio decidis donaci 5,6 milionojn da usonaj dolaroj por financi la eldonadon de la *Kuriero* en la ses UN-lingvoj. La novaĵo tuj atentigis min, ke venas ĝusta momento por eldoni *Unesko-Kurieron* en Esperanto.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



La unua ĉi-jara kunveno de la societo Vydūnas, okazinta la 11an de januaro en la Vilna Instruista Domo, estis dediĉita al unu el adeptoj de la filozofo Vydūnas – vojaĝanto, pedagogo kaj esperantisto Liudas Alseika (1887-1960). Inter la prelegintoj en ĉi tiu kunveno estis Vytautas Ŝilas, kies raporton pri Alseika ni publikigas en ĉi tiu *Ondo*.

Liudas Alseika esperantistiĝis kaj pereis en Ruslando

La jaro 2018 estas la jaro de Vydūnas (1868-1953), litova filozofo, verkisto, kultura aganto, homamanto influita de idealisma hinda filozofio, praktikanto de sana vivado el la nordprusia urbo Tilžė (germane: Tilsit, nun Sovetsk en Ruslando). La Vydūnas-noma Societo (Vydūno draugija) dediĉis sian unuan ĉi-jaran aranĝon la 11an de januaro al unu el adeptoj de Vydūnas – litova vojaĝanto, pedagogo, naturŝatanto kaj esperantisto Liudas Alseika (1887-1960). En la salono kunvenis preskaŭ cent partoprenantoj – vidunistoj, vojaĝantoj kaj esperantistoj. Estis bonŝanca vespero – vojaĝŝatantoj kaj disĉiploj de Vydūnas eksciis detalojn pri Esperanto, esperantistoj – pri la ideoj de Vydūnas, pri la grandvojaĝo de L. Alseika.

Liudas Alseika naskiĝis la 25an de aprilo 1887 en la bieno Kvietkeliai (distrikto Šiauliai), lernis en la gimnazio de Šiauliai. Pro kontaŭcarismaj eldiroj li estis eksigita el la gimnazio. Poste li iris al la urbo Ufa (Baŝkirio), kie li akiris la specialecon de inĝeniero-geodeziisto (1910). Kiel termezuristo li laboris en Uralo, Kaŭkazo kaj aliloke. Estis tempo, kiam li instruistis en la For-Orienta urbo Vladivostok. En 1921 li revenis al Litovio. Tie ĉi li edziĝis kaj ekhavis du filinojn Milda-Mirinda kaj Enigma. Pro meritoj ĉe okazigo de litova agrara reformo L. Alseika en 1934 ricevis la ordenon Gediminas.

L. Alseika estis iniciatinto de bicikla turismo en Litovio; en 1957 li organizis biciklan veturadon ĉirkaŭ Litovio. La 1an de majo 1960 li ekgvidis la 11-milkilometran biciklan veturadon de Klaipėda al Vladivostok. Biciklis sep personoj: kvin litovoj kaj du estonoj. La naŭan tagon de la vojaĝo li pereis ĉe la urbeto Goroĥovec – la itinero iris laŭ la konstruata ŝoseo Moskvo-Gorkij. Tie L. Alseika biciklis kape de la grupo kaj neatendite lin frapjetis alveninta kamiono. Por “preni” la patron venis lia filino Milda-Mirinda kun granda ujo da akvo el la Balta Maro. La grupo daŭrigis la bicikladon, la 9an de oktobro ĝi atingis la celon kaj en ĉeesto de multaj ĵurnalistoj solene verŝis la baltmaran akvon en Pacifikon.

La memorgesperon gvidis prezidanto de la Vydūnas-noma Societo Tomas Stanikas. Malnovan filmitan materialon pri L. Alseika demonstris prezidanto de Vilna Klubo de Vojaĝantoj Algimantas Jucevičius. Iom da rememoroj prezentis la nepino de L. Alseika Svajonė (Revo) Merilienė (prezidantino de Vilna Handikapa Sporta klubo). Ŝi rakontis pri sia patrino Enigma Alseikaitė, la onklino Milda-Mirinda Alseikaitė. La ĉefrakontinto estis la verva 86-jara litova verkisto, dramisto Kazys Saja.

En 1949 K. Saja eklernis en Terkultura teknika lernejo en Klaipėda. La geodezion tie ekinstruis la grizbarba L. Alseika. La lernejan spertis, ke ilia instruisto estas denaska pedagogo kaj, kiel oni poste eksciis, ankaŭ inspirita adepto de Vydūnas, liberpensulo (li kredis al supernatura krea Forto, sed ne al homsimila

grizbarba Dio) kaj entuziasma esperantisto. Li ĉiam trovis okazojn por rakonti pri la historio de Litovio (la temo, kiun sovetaĵaj lernejoj evitis), pri la esenco de la vivo. K. Saja estis orfo, kaj L. Alseika baldaŭ proksimuliĝis kun li kaj rakontis al li multon el sia bunta vivo. Ankaŭ pri Esperanto (la instruisto ĉiam estis kun la verda stelo aŭ kun iu floreto sur la jaka roverso!). La estonta verkisto eksimpatiiis kun Esperanto, tamen ne lernis ĝin. Li rememoris pri aŭditaj Esperanto-vortoj, pri litovismoj en Esperanto: la vorto “persekuti” litovlingve estas ja “persekioti”!

Pri la persona konateco de L. Alseika kun la filozofo Vydūnas kaj pri iliaj viv-konceptoj parolis la honora prezidanto de Vydūnas-noma Societo filozofo Vacys Bagdonavičius. Iom pri esperantista vivo de L. Alseika rakontis Vytautas Ŝilas.

Liudas Alseika esperantistiĝis en 1911. La lingvon li lernis de la rusa poeto-esperantisto N. Krasovskij kaj de la rusa Esperanto-pioniro V. Zavjalov. Dum 1916-1918 L. Alseika loĝis en Japanio: tie li interkompreniĝadis per Esperanto kaj helpe de esperantistoj. Esperanton ellernis ankaŭ la edzino Maria kaj la filinoj Milda kaj Enigma (ankaŭ la nepino iom scipovas Esperanton!). L. Alseika sole partoprenis en UK-14 (Helsinki), UK-26 (Stokholmo) kaj UK-28 (Antverpeno), kun sia edzino en UK-15 (Nurnbergo), kun sia filino Mirinda en UK-30 (Londono). Tuj post la Dua Mondmilito la filinoj estis ekzilitaj Siberion, sed post lerta sinturno al la Sovetia prezidanto Kalinin la patro sukcesis revenigi ilin al Litovio. En la fino de 1956 L. Alseika rekreis la Esperanto-agadon en la urbo Klaipėda, kaj gvidis (ne nur tie) multajn Esperanto-kursojn. Instruis Esperanton ankaŭ lia filino Milda-Mirinda Petrylienė.

En la personeco de L. Alseika la Litova E-movado perdis ageman samideanon, kiu malgraŭ sia 73-a jaraĝo restis vivovigla sportanta vegetarano (ĉiujare li dum 2-3 semajnoj malsatadis). Laŭ la rememoro de la verkisto K. Saja, L. Alseika la prudenton kaj animan fortecon ĉerpis el komunikado – ne nur kun homoj, sed ankaŭ de la naturo mem.

Vytautas Ŝilas

Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Aperos en februaro 2018

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo



Jubileoj kaj memordatoj en februaro 2018

2. Antaŭ 15 jaroj mortis **Lou Harrison** (1917-2003), usona komponisto kaj esperantisto, kiu verkis poemojn en Esperanto kaj donis Esperantajn titolojn al pluraj el siaj muzikaj verkoj, i.a. al *La Koro Sutro* (1973).

7. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko** (Боровко, 1863-1889-1913), ruslanda instruisto, ĵurnalisto kaj esperantisto, prezidanto de la Peterburga E-societo *Espero* (1896-1897), aŭtoro de kelkaj beletraĵoj (i.a., *En la tombo*, 1892), tradukinto de *La ŝtona gasto* de Puŝkin (1895); laŭ lia instigo L. Zamenhof skribis sian faman leteron pri la deveno de Esperanto (1895).

18. Antaŭ 35 jaroj mortis **Louis Beaucaire** (1925-1941-1983), franca librovendisto kaj esperantisto, aŭtoro de tri humoraj libroj: *Kruko kaj Baniko el Bervalo* (1970), *El la vivo de bervalo sentaŭgulo* (1974), *Fabeloj de la verda pigo* (1981).

19. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Helmar Gunter Frank** (1933-1974-2013), germana sciencisto, direktoro de Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn kaj esperantisto; lanĉinto de la projekto "Lingvo-Orientiga Instruado" kiu evidentigis la propedeŭtikan valoron de Esperanto, kunfondinto kaj prezidanto de la Eŭropa Klubo (1974-2009), iniciatinto (1983) kaj la unua prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS), aŭtoro de pluraj E-verkoj, la Esperantisto de la Jaro 2004.

23. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Yosimi Umeda** (1933-2010), japana flugkompania manaĝero, ŝintoisto, oomotano kaj esperantisto, estro de la Internacia Fako de Oomoto, estrarano de Japana E-Instituto (1979-92), estrarano de TEJO (1964-66), estrarano kaj vicprezidanto de UEA (1986-89), aŭtoro de *Manlibro por praktika komunikado en Esperanto*.

26. Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Hugo Steiner** (1878-1911-1969), aŭstra fervojoficisto kaj esperantisto, iniciatinto kaj la unua direktoro de la Internacia E-Muzeo ekde ties fondo (1929), prezidanto de Aŭstria E-Delegitaro (AED, 1925-30), prezidanto de Aŭstria E-Asocio (1933-38), fondinto kaj redaktoro de *Aŭstria Esperantisto* (1924-38), estrarano de UEA/IEL (1934-38), prezidanto de LKK de la 28a UK (Vieno, 1936), aŭtoro de pluraj libroj kaj artikoloj.

26. Antaŭ 115 jaroj en germana-pola familio naskiĝis Johannes (pole: Jan) Fethke (1903-1919-1980), pseŭdonime **Jean Forge**, filmreĝisoro, scenaristo, verkisto kaj esperantisto, aŭtoro de tri romanoj (*Abismoj*, 1923; *Saltego trans jarmiloj*, 1924; *Mr. Tot aĉetas mil okulojn*, 1931) kaj du novelaroj (*La verda raketo*, 1961; *Mia verda breviero*, 1974), dublinto de la germana filmo *Morgaŭ komenciĝos la vivo* (la unua longdaŭra E-sonfilmo, 1934), reĝisoro de la filmo *Verda stelo super Varsovio* (1959).

26. Antaŭ 65 jaroj mortis **Nikolaj Ivanoviĉ Hoĥlov** (Хохлов, 1891-1905-1953), rusa ekonomikisto kaj esperantisto, sekretario de la lingva komisiono de SEU, gvidanto de la E-sekcio de la amikeca societo VOKS, en Esperanto konata ankaŭ kiel Nikolao Hohlov – aŭtoro de la poemaro *La tajdo* (1928), tradukinto de beletraĵoj, politikaj kaj fakaj verkoj.

Kompilis **Aleksander Korĵenkov**

Kulturo



Esperantistojn oni ofte nomas “libra popolo”, ĉar la Esperanto-komunumo naskiĝis kiel sekvo de la eldono de la Unua Libro. Poste aperis la dua, deka, centa, mila...Kaj kio pri plej novaj libroj Esperantaj? Ĉi tiun demandon respondas Paweł Fischer-Kotowski, kiu prezentas la plej interesajn pasint-jarajn librojn. Lian superrigardon garnas la tradicia statistiko de Aleksander Korĵenkov pri la libroproduktado en Esperantujo. (Foto el la Seula libroservo: Anna Striganova)

La libroj de la jaro 2017

La jaro 2017 estis avara je novaj Esperanto-libroj. En la lastaj 12 monatoj sur la bretoj de la Libroservo de UEA aperis nur iom pli ol 150 novaj varoj, plejparte libroj. Ne temas nur pri libroj esperantlingvaj. Tiuj, kiuj ne estas en Esperanto, estas tradukoj el Esperanto aŭ ili temas pri la lingvo kaj movado.

Ĉiuj novaj libroj estas menciataj en la rubriko “Laste aperis” de la revuo *Esperanto* kaj en la samtitola reta novaĵletero. Ĉi-jare la rubriko aperis en 7 numeroj, dum pasintjare la listo publikiĝis 10 fojojn. Eĉ se la kvanto de novaĵoj estas malpli granda, ne nepre estas facile orientiĝi en la merkato. Kiuj interesaj titoloj surmerktiĝis en 2017? Same kiel pri 2016, mi pretigis subjektivan trarigardon.

Prozo originala

Dum la ĵus finiĝinta jaro surmerktiĝis tri novaj originalaj romanoj, ĉiuj el la plumoj jam konataj al la publiko. La unua el ili estas *Amo inter ruinoj* de Trevor Steele, kiu fakte eliris el la presejo ankoraŭ fine de la antaŭa jaro kaj tial portas la jaron 2016 titolpaĝe. Kvankam la intrigo disvolviĝas en la Esperanto-medio de la komencaj 1990-aj jaroj, la titolaj “ruinoj” ne priskribas nian movadon, kiu tiutempe estis pli vigla, sed aludas la disfalantan tiam Sovetunion. La ĉefrolulo estas la aŭstraliano Travis, kio povas pensigi kiomgrade la rakonton diktis la realo. La libro estas verkita en Steele-a stilo, spicita per manpleno da kuraĝaj scenoj.



Ĉe la sama eldonejo aperis fine de 2017 ankaŭ *Murdo en la teatro*, la sepa krimromano de Ronald Cecil Gates. Li estas sendube nun la plej fekunda aŭtoro de tiu genro en Esperanto. Ĉi-foje la trovita mortinto estas aktoro, kiu baldaŭ devus surscenejiĝi en la universitata teatro. Ankaŭ ĉi tiun fojon la murdiston serĉas la komisaro Roberto Elis, sed verŝajne li bezonis por tio pli da tempo, ĉar la libro, kun 150 paĝoj, estas pli longa ol la antaŭaj verkoj de Gates.

Tute alia estas la tria romano, *El ombro de l' tempo* de Sten Johansson, kun psikologiaj ambicioj. En la romano la nuntempo interplektiĝas kun la 1970-aj jaroj. Tiel la bildoj el la juneco de la protagonisto helpas nin kompreni liajn hodiaŭajn sentojn kaj decidojn. Interese kiom aŭtobiografia estas tiu libro, en kiu la ĉefrolulo estas verkisto...

Ne romano, sed ene de la limoj de la rubriko “prozo originala”, estas la libro de Kalle Kniivilä *La strato de Tanja*. Ĉi tiu nefikcia rakonto, verkita surbaze de dokumentoj kaj rememoroj, pentras historion de unu el la sanktpeterburgaj stratoj en la lasta jarcento. La aŭtoro uzas la 1,5 kilometrojn longan vojon kiel pretekston por rakonti pri la vojo de Sovetio kaj la post-soveta Rusio. Same kiel la tri antaŭaj

libroj de Kniivilä, ankaŭ ĝi aperis preskaŭ samtempe en finna, sveda kaj Esperanta eldonoj.

Prozo tradukita

Malofte ni spertas ke iu romano freŝe aperinta nacilingve kaj aprezata de vasta landa publiko, tuj ricevas Esperanto-tradukon. Tiel okazis pri *La nigra patrino Tero* de Kristian Novak, kiun elkroatis Josip Pleadin. Alia atentinda traduko estas la galega *Memoraĵoj de kampara knabo* de Xosé Neira Vilas, kiun esperantigis Suso Moinhos. Ĉi tiu dua eniris la prestiĝan Serion *Oriento-Okcidento* kun n-ro 53.

Notindas ankaŭ *Kara mia homo* kaj *Mi respondas pri ĉio*, la du lastaj volumoj el la trilogio *La afero al kiu vi servas* de la fama soveta verkisto Jurij German, en la Esperanto-versio de Jurij Finkel.



Poezio

Legu po-ete estas krono de la traduka laboro de Gerrit Berveling. Sur pli ol 400 paĝoj ĝi kolektas liajn disajn poemojn tradukitajn tra la lastaj jardekoj. Jam la titolo sugestas, ke engluto unufoja de la tuto ne eblas.

Por tiuj, kiuj konas *Dialogo* de Júlia Sigmund, longa enkonduko pri la nova *Doloro* ne necesas. Originala – tre bela! – Esperanto-poemo de Sigmund aperas en kelkdeko da tradukoj (ĉi-foje 54). La tuto en bela formo, kiu igas la eldonaĵon taŭga ideo por donaco. Mi mem ne povas ĝui la tuton, sed laŭ la interparoloj kaj komparoj mi konkludas ke iuj el la tradukoj estas etaj majstroverkoj.

Esperanto-movado



La plej grava primovada libro en 2017 estas sendube *Kie miozotas memor* de Ed Borsboom, kiu eble unuavide ne ŝajnas tia pro sia malgranda formato. Kolekto de trideko da esperantistaj portretoj en mallonga, anekdoteca formo estas io, kio povas ekinteresi eĉ tiujn, kiuj “ĉi tien venis por ebriiĝi...”. Kvankam seriozaj esperantologiaj studoj, ankaŭ biografioj, estas bezonataj – kaj Borsboom mem estas sukcesa sur tiu kampo kun siaj “Vivo”-j de Lanti kaj Cseh – tiu ĉi formo povas atingi pli vastan publikon. Tio ne nur kontribuas al konstruo de komuna fundamento por la esperantistaro (kaj ne nur novuloj!), sed ankaŭ povas sproni al pliaj esploroj kaj legaĵoj pri unuopaj personoj kaj fenomenoj. Nepre rekomendinda!

Lige kun la 100-a mortodatreveno de L.L. Zamenhof UEA edonis *Zamenhof*

en Varsovio de Roman Dobrzyński, Esperanto-version de la pollingva originalo eldonita samjare. La libro pretendas esti samtempe iom gvidlibro pri Varsovio, iom historia verko pri la urbo, iom pri Zamenhof mem. La aŭtoro nenecese serĉas pol-econ de D-ro Esperanto.

Alia libro kiun mi klasis primovada, kvankam ĝia teamo estas iom pli vasta, estas biografio pri “eksterordinara homo” (eĉ laŭ la subtitolo) *Francisko Valdomiro Lorenz*, verkita en la ĉeĥa de Vlastimil Novobilský (Esperanto-traduko de Margit Turková). *Omaĝe al Tibor Sekelj* estas kolekto de kvar prelegoj prezentitaj en la samtitola seminarieto en Bjelovar en oktobro 2016.


Reeldonoj

La eldonejoj *Libro-Mondo* kaj *Fonto* daŭrigas laŭdindan reeldonan agadon. Ĉe la unua reaperis interalie la versdramo de Geraldo Mattos, *Ivan la Sesa*. La originala tragedio eldoniĝis unuafoje en 1953 kaj estis tre avangarda por sia tempo.

Alia reeldono de originalaĵo estas *Karlo* de Edmond Privat – per ĉi tiu 16-a el la oficialaj eldonoj la rakonto certigas al si la unuan lokon inter la plej ofte reeldonitaj Esperantaj beletraĵoj. Ĝi ja estas konata al preskaŭ ĉiuj esperantistoj, verkita en facila lingvaĵo kaj legata kutime tre frue post la unua kurso. Nun por la unua fojo en iom arta eldono, kun malmola kovrilo.

Sur la merkaton revenis ankaŭ *Printempo en la aŭtuno* de Julio Baghy, kiu laŭ la intencoj de la eldoninto, malfermas novan eldonserion, en kiu aperos la tuta verkaro de Paĉjo – fakte tiu, kiu legis la vastajn tavolojn de esperantistoj en la 1930-aj jaroj kaj ĝis nun restas aŭtoro ŝatata kaj konata en nia komunumo, eĉ por tiuj, kiuj ne aparte interesiĝas pri literaturo.

La fama traduko de la pola *Faraono* de Bolesław Prus en la plenumo de Kazimierz Bein fermas la liston de la reeldonoj de *Fonto* de la verkoj de Kabe. Ankaŭ nun la rakonto pri malnova Egiptio aperas en tri volumoj, kvankam aspekte pli modestaj ol la antaŭaj du eldonoj, kun kovrilpaĝoj laŭ la stilo de la fruaj 1990-aj jaroj. Tamen, ĝi ja estas interesa por iu, kiu ne volas aŭ ne povas legi ĝiajn polvokovritajn antaŭulojn (la lasta el 1957).



Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nia libroproduktado en la plej mallonga jaro

Ekde sia renaskiĝo *La Ondo* ĉiujare publikigas statistikon de la libroproduktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik, kiun li komencis en la legenda (kaj leg-enda) Budapeŝta revuo *Hungara Vivo*. Por tiuj, kiuj unuafoje abonas *La Ondon*, ni ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn povas ne legi niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de ĉi tiu statistiko estas la rubriko “Laste aperis” en la revuo *Esperanto*, en kiu estas registritaj ĉiuj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro (= abonjaro de la revuo *Esperanto*, de la 1a ĝis la 12a numeroj). La jartabelojn akompanas resumaj tabeloj por la jam 27-jara periodo de nia statistikado.

Tia statistiko ja estas kritikebla.

Unue, en “Laste aperis” estas menciataj pluraj libroj, eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro, ekzemple, ĉar la eldoninto ne sendis specimenon al Roterdamo. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro. Sed la resuma statistiko glatigas la fluktuaĉon kaj fideinde vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn Esperanto-librojn, kaj en “Laste aperis” kutime mankas, ekzemple, lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj malmultekzemplere eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj aŭ lokaj renkontiĝoj. Same mankas en “Laste aperis” kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado en libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocianoj.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn la aŭtoroj (kutime, senpage) ofertas en la virtuala mondo sen zorgi pri papera eldono por ne pagi la eldonkostojn. Tio reduktas la rikolton de libroj paperaj. Sed ne estas pli granda statistika bazo ol la kritikebla, sed ne kritikenda “Laste aperis”.

Kiom da monatoj estas en la jaro?

Jaro	Libroj	Paĝoj	Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091	2005	159	23.780
1992	205	25.789	2006	204	30.078
1993	136	18.511	2007	184	31.183
1994	188	22.078	2008	158	25.381
1995	200	23.345	2009	158	24.272
1996	232	28.637	2010	204	28.232
1997	273	27.727	2011	172	19.775

1998	208	28.769	2012	153	23.144
1999	208	24.460	2013	178	25.344
2000	235	25.869	2014	107	14.024
2001	222	31.520	2015	172	25.629
2002	174	26.451	2016	189	32.323
2003	224	28.424	2017	139	23.353
2004	183	27.295			

La statistiko montras, ke dum la lasta jardeko de la 20a jarcento averaĝe aperis 210 libroj jare, dum la unua jardeko de la 21a jarcento la jara averaĝo estis 191 libroj, kaj en la komencaj sep jaroj de la nuna jardeko (2011-17) "laste aperis" 1110 libroj, aŭ nur 158 libroj jare.

La 2016a jaro estis "grasa" kun rekorda paĝonombro, neniam atingita en la antaŭaj 25 jaroj. Tiu kresko okazis ne laste pro tio, ke la jarkolekto 2016 de la revuo *Esperanto* kompletigis ne novembrofine, sed nur en februaro, ĝi kovris ne 12 monatojn sed pli ol 14. Pro la reakuratigo de la aperritmo la jarkolekto 2017 pretiĝis dum nur 10 monatoj, kaj, nature, la 10-monata jaro 2017 estis multe pli magra ol la 14-monata jaro 2016. Dum ĉi tiu stumpa jaro aperis nur 139 libroj, notinde ampleksaj (je 33 paĝoj pli ol averaĝe), inter kiuj nur 13 (malpli ol dekono) estis broŝuroj malpli ol 49-paĝaj.

La tema distribuo en la pasinta jaro (= jarkolekto 2017) estis kutima.

	1991-2015	2016	2017	1991-2017 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	4802	189	139	5130
Suma paĝonombro	635.808	32.323	23.353	691.474
Nombro de la eldonintoj	1162	75	64	1202
Averaĝa paĝonombro de unu libro	132	171	168	135
Averaĝa prezo de unu libro (eŭroj)	10,00	12,84	13,01	10,19
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	699	20	26	745
Originala beletro	562	30	15	607
Traduka beletro	997	28	32	1057
Lingvistiko, esperantologio	555	23	14	592
Eo: historio, kulturo, movado k. s.	639	28	17	684
Politiko, historio, filozofio, socio	513	34	26	573
Scienco kaj tekniko	294	5	1	300
Religio	235	14	5	254
Aliaj temoj	308	7	3	318

Ĉampano por Lutermano!

En ok el la naŭ lastaj jaroj la plej aktiva Esperanto-eldonejo estis MAS (Monda Asembleo Socia), prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kiu eldonas plejparte verkojn de maldekstraj aŭtoroj kaj beletron. MAS ankaŭ ĉi-foje plej altas kun 23 libroj – pli multe ol kune produktis *Mondial* kaj Dokumenta E-Centro, kiuj sekvas en la plejlisto.

2017. Libroj		2017. Paĝoj	
MAS (Francio)	23	MAS	4237
DEC (Kroatio)	10	Mondial	1935
Mondial (USA)	10	DEC	1753
Horizonto (Japanio)	6	Fonto	1084
J. Drahotová (Ĉeĥio)	5	KAVA-PECH	894
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	5	Horizonto	735
Fonto (Br.), Impeto (Rus.)	4	Orion art (Serbio)	664
L. Gbadamassi (Benino)	4	KEA (Koreio)	619
La Blanchetière (Francio)	4	Aracne (Italio)	562
Libro-Mondo (Pollando)	4	Libro-Mondo	537

Ĉi tiu kvanta dominado reliefiĝis ankaŭ kvalite. Aldoninte 23 librojn, MAS rompis la multjaran “hegemonion” de UEA kaj finfine okupis la unuan lokon en la resuma listo. Samtempe MAS devancis Flandran Esperanto-Ligon kaj iĝis la unua ankaŭ laŭ la suma paĝokvanto. Estas aparte atentinde, ke MAS eldonis 166 librojn dum nur dek jaroj, dum UEA kaj FEL eldonas seninterrompe dum 27 jaroj.

1991-2017. Libroj		1991-2017. Paĝoj	
MAS	166	MAS	23912
UEA	163	FEL	23467
Libro-Mondo	145	Mondial	23201
FEL	129	Fonto	21156
Fonto	126	UEA	20042
Impeto	117	Libro-Mondo	19838
Edition Iltis (Germanio)	116	Impeto	18461
Mondial	112	KAVA-PECH	16592
KAVA-PECH	97	Sezonoj	13898
Sezonoj (Ruslando)	86	AEP (Svislando)	12789

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La derviŝoj¹

Skizo de Tigran Pogosjan

– *Ja haak!*² – ekkris derviŝo kaj eniris komercejon, kie mi servis dum 19... jaro, en unu el multthomaj urboj de Perslando.

– *Ja haak!* – ripetis li kaj surgenuiĝis apud la forno, sur la tapiŝo, etendante malvarmumitan manon al la hejtata forno. Mi leviĝis, alproksimiĝis al la derviŝo, elprenis cigared-skatoleton, etendis al li, donis unu cigaredon kaj sidiĝis sur la seĝo apud la sojlo.

Dum la senokupaj horoj mi ordinare ŝatis interparoli kun la derviŝoj; jen, tiun ĉi fojon ankaŭ mi komencis demandi:

– Diru al mi, derviŝ-*baba*³, kion vi adoras? Kio estas en la mondo plej sankta por vi?

– *Haak!* – ekkriis la derviŝo.

Vero, jen la adoraĵo de l' derviŝo, lia lozungo⁴, tion li adoris, tio estis lia sanktaĵo kaj ĉio...

– Vero, – ripetis mi. – Mi ankaŭ kaj ordinare multaj personoj adoras la veron, ni devas adori kaj sekvi ĝin.

– Jes, prave, – diris la derviŝo, – vi, mi, aliaj miloj da homoj adoras la veron kaj ĉiam parolas pri la vero, sed ĉiu persono laŭ sia vidpunkto komprenas la veron; kiu estas prava? Tio ĉi ankoraŭ estas demando.

– Sed en kio konsistas diferenco inter la vero adorata de mi kaj la adorata de vi? – demandis mi.

– En tio, ke ĝuste ĉio, kio por vi estas vera, por mi estas absolute malvera, – respondis li kaj aldonis:

– Jen, al vi unu demando. Kiam homaro ankoraŭ ne havis komprenon pri la scienco, nek pri la kulturo kaj vivis sovaĝe, tiam en la mondo aperis du talentuloj, du famaj homoj. Unu el ili eltrovis *alkoholon*, alia elpensis *monon*. Nun diru, mi petas vin, kiun el tiuj du talentuloj vi ŝatas plej alte kaj al kiu vi plej simpatias, – demandis la derviŝo.

Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Leteroj de kvin geamikoj al Julia, Julieta



Júlia Sigmond. *Kvin geamikoj*. Cluj-Napoca: Exit, 2016, 480 p.

Hungarino naskiĝinta en Rumanio, Júlia (Esperante: Julia) Sigmond lernis Esperanton en 1956, sed aŭdis pri ĝi de amiko de la familio je dudek jaroj pli frue. Al la lingvo ŝin logis ŝia ŝatokupo – korespondado. Ne estas surprizo, ke ankaŭ la aŭtorino de ĉi tiu recenzo-prezento havis la saman kaŭzon por veni al Esperanto-kurso student-aĝe.

Unue Julia korespondis kun sia Esperanto-instruisto, onklo Eŭgeno; ekaŭskultinte Esperanto-programojn de Pola Radio, ŝi iĝis korespondanto de PR. Tiel, skribante al PR, ŝi konatiĝis kun Ada Sikorska, danke al kiu en *Heroldo de Esperanto* aperis jena anonco de Julia:

Mi sopiras je fidelaj, korespondemaj geamikoj. Mi kolektas nek poŝtmarkojn, nek bildkartojn, nek alumetikedojn, nur amikajn animojn de ĉiu parto de la mondo.

Responde al la anonco Julia ricevis 76 leterojn el 25 landoj! Kun kelkaj el ili ŝi korespondis dum jardekoj. “Memore al ilia sincera amo kaj ververa amikeco” Julia Sigmond pretigis libron kun leteroj adresitaj al ŝi de ŝiaj “kvin treege bonaj korespondgeamikoj”.

La nuna epoko grave ŝanĝis la interkomunikadon, paperaj leteroj iĝas rara afero, eĉ festajn gratulkartojn oni sendas retroŝte, en sociaj retoj aŭ per mesaĝiloj. Nun Julia Sigmond, konforme al la epoko, sendas al siaj geamikoj rete “monatajn” leterojn. Sed novaj kanaloj neniel ŝanĝas la sincerecon de ŝiaj mesaĝoj.

En la dika volumo estas kolektitaj leteroj de Ada Fighiera-Sikorska, Johannes Palu, Nikolao Danovskij, Stanisław Janusiewicz kaj Tibor Sekelj (parenteze, nur la nomon de Janusiewicz mi ne konis).

El la kvinopo, Ada Sikorska estis la unua kaj la plej longa korespondanto de Julia Sigmond, la unua publikigita enlibre letero estas de la 1a de novembro 1959 (Varsovio), la lasta de la 9a de decembro 1995 (Torino).


Ĝi estas demonstra versio de la 72-paĝa februara *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.


Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.





1. Organika kombinaĵo C_2H_6 ; 2. Nedezirata dombesto kun longa vosto; 3. Unu el la emblemoj en la ludkartoj; 4. Trinkaĵo devenanta laŭlegende el Etiopio; 5. Alia emblemo en la ludkartoj; 6. Inter ... kaj rakonto staras meze granda monto; 7. Planedo, kie somero daŭras 21 jarojn; 8. Kaverno; 9. Radiklegomo uzata por manĝado kaj furaĝo; 10. Ĉefurbo de Samoo; 11. ... pafas, Dio trafas; 12. Aŭstralia struto; 13. Kaj serpento, kaj skarpo; 14. Centono de la skandinavia krono; 15. Struto el Suda Ameriko; 16. Natria karbonato; 17. Birdo – simbolo de hejma fajrujo, familiaj tradicioj kaj kutimoj en Ĉinio; 18. Alt(et)a terpeco elstaranta en la maro; 19. La eterna urbo; 20. Pasia am’; 21. Kuireja ujo, ĉirkaŭ kiu, laŭ Zamenhofs proverbo, dancas kato; 22. Enspez’ pro investita kapitalo; 23. “Alpisto” elinter lacertoj; 24. Frazo metita antaŭ verko; 25. Nedaŭra furorkutimo.

La respondoj atingu la redakcion antaŭ la 25a de marto.

Kompilis **Viktor Alikin**



Gratulon al Valentin kaj Irina

Ni kore gratulas nian redakcion, Moskvan poeton, tradukanton kaj recenzanton Valentin Melnikov okaze de lia edziĝo, en Moskvo la 20an de januaro 2018! Ni deziras al li kaj al lia edzino Irina sanon, longan feliĉan vivon; aparte al Valentin novajn kreajn sukcesojn, kaj al Irina hejmiĝon en Esperantujo!

La Ondo

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Pli bone malfrue ol neniam

Ambaŭ viroj petis novan proceson, kiam ili estis ekzekutitaj. (Japanio: la sekretaj ekzekutoj daŭras, 6 jan 2018, <http://neniammilitointerni.over-blog.com/2018/01/japanio-la-sekretaj-ekzekutoj-dauras.html>)

Videble nevidebla, aŭ: konsekvenco sen sekvenco

Tio malfermas perspektivojn en EU sen antaŭvideblaj konsekvencoj. (Zlatko Tišljar: *Kiom sukcesa la jaro 2017? // Eŭropa Bulteno*, 2017, N^o176, p. 2)

Dekomence ĉifita

... eldono de turisma faltfolio de la urbo Slovenj Gradec (Karintia regiono de Slovenio) en Esperanto... (Ostoj Kristan: *Zamenhofa Tago 2017 en Slovenio // Eŭropa Bulteno*, 2017, N^o176, p. 6)

Inter amboso kaj... odoro

Ĉeestis... Ambasodoro de Korea Respubliko ĉe Vatikano... (Michela Lipari: *Agadoj de Itala E-federacio en la Zamenhof-Jaro // Eŭropa Bulteno*, 2017, N^o176, p. 7)

Sen akuzativo sekvoj ne grandas

Kiam la londona grupo gastigas ĵurnalisto etas bonaj sekvoj (Stefano Keller, tradukado@yahoogroups.com, 11 jan 2018; rimarkis Russ Williams)

Pura putriotismo

Nia putrujo - lando plena de laboro kaj entuziasmo, plena, de rememoraĵoj kaj naturbelajaĵoj! Jarcentojn kaj jarmilojn kulturis ĝin niaj prapatroj kaj patroj kaj el iliaj kalojĉirk-aŭis nian landon koljuvelo de homa kreo-povo. (Inĝ. Vlastimil Kočvara: *En somera tempo // Fajrero*, 1959, N^o3)

Pasive datreveni

Malago honoris la Zamenhofan jubileon (HeKo 670 4-B, 17 jan 2018, <http://www.esperantio.net/index.php?id=3438>)

Preciza neniamo

La Dua Bulteno aperos inter la fino de januaro kaj komenco de februaro 2018. (Clay Magalhaes: *intervjuo "Malferme" // Esperanto*, 2018, N^o2, p. 27).

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: swanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

**30-a Internacia
Esperanto-Konferenco**



Temo:

ESPERANTO EN ARTOJ

**21-a ĝis 27-a julio 2018
en kastelo Grésillon (Francio)**



**Riĉaj prelega, kultura
kaj turisma programoj**

**Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe:
osiek.org/iek**



LIPTOVSKÝ MIKULÁŠ (SK) 14 - 22 JULIO 2018

Venu sperti la plej mojosan someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu: <http://ses.ikso.net>



103-a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, 28 julio - 4 aŭgusto 2018

